# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013
2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj
Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-46 sendita el Budapeŝto la 28an de oktobro

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Ĉinio organizas retan kurson

Fine de septembro 2021 okazis malfermo de Esperanto-kurso per Voĉato (*Wechat*) por 280 aliĝintoj el 23 provincoj kaj regionoj tra Ĉinio, kaj ankaŭ el kelkaj aliaj landoj. La ceremonion partoprenis la prezidanto de IKEF, s-ro Ĉielismo Wang Tianyi; gvidanto de la kurso, s-ro Ludoviko Zhang Cheng Hua, kaj s-ino Saĝa Huang Min, kiu sukcese organizis la kurson. Dum la malfermo s-ino Hela Zhang Ming Yue deklamis gratulan mesaĝon de s-ro Enkhee Chimedtseren, kiu sendis ĝin al la partoprenantoj nome de la IKEF-Sekretariejo kaj Mongola Esperanto-Societo. S-ino Saĝa Huang Min raportis al la ĉeestantoj pri siaj preparaj laboroj por organizi la kurson kaj reprezentantoj de la provincoj kaj regionoj prezentis pri siaj kursanoj. Poste s-ro Ĉielismo faris gratulan kaj kuraĝigan paroladon, esperante ke la kursanoj bone lernos la lingvon cele por utiligo de profesia aplikado kaj siaj karieroj. Tio estas peza tasko, kaj ni atendas ilian aktivan agadon kadre de IKEF. Laste, kelkaj kursanoj prezentis siajn deklamojn kaj kantojn kontribuante al la programo. La ceremonio estis sukcesa kaj gaja, kaj ĝi finiĝis per la himno 'La Espero'. La kurso daŭros unu semestron.




Laŭ komuniko de la IKEF-Estraro

# Aktivas ankau ĈEL

Ni havas planon verki artikolon por prezenti Esperanton al la publiko en niaj kontoj en *Wechat* kaj *Douyin,* ĉina versio de *Tiktok,* por tiuj kontoj ni regule verkis artikolojn

kaj faris mallongajn videojn por prezenti Esperanton en la ĉina lingvo al la publiko. Krome ni havas planon okazigi forumon de e-istaj aktivuloj en Ĉinio kadre de AMO de UEA ĉirkaŭ la Zamenhofa Tago, kaj mi esperas, ke pli da e-istoj el aliaj landoj povas veni por kune kun ni diskuti la rilatajn temojn.

Chen Ji, Direktoro de Oficejo de Ĉina Esperanto-Ligo

# La trimonataj komunikoj de ILEI pluiras!

La antaŭa prezidanto de ILEI, s-ino Mirejo Grosjean, starigis jam frue en ŝia mandato la ekzemplodonan kutimon raporti 4-foje jare al la komitato, membraro kaj sekcioj de ILEI pri la agadoj de la antaŭaj tri monatoj. Tipe temis pri detalaj kaj ampleksaj raportoj, pri kiuj EKO regule raportis. Laŭdinde estas, ke la nova prezidanto, d-ro Ahmad Mamduhi el Irano, transprenis la kutimon kune kun nova estrarano, s-ino Alessandra Madella. Ĵus aperis la unua el iliaj trimonataj raportoj. Tiu legeblas kaj elŝuteblas de

https://www.ilei.info/agado/2021-10-15_Raporto_pri_trimonata_periodo.pdf

Ĝi portas informojn pri la okazinta julia virtuala kongreso de ILEI, kiu inkluzivis la (virtualan) AMO-seminarion 76 kaj multon pli. Aperas informoj pri la sekvaj kongresoj en 2022 (Kebekio, Kanado) kaj 2023 (Massa, Italio). Aperis informoj pri la ILEI-forumo, premio La Torre (vidu EKO 43), universitata agado, eldonado (libroj kaj revuoj), rilatoj kun TEJO kaj UEA, kaj venis la fino per dankvortoj, inter ili: 'La Estraro aparte dankas Mirejon, kiu […] multe helpis per siaj konsiloj kaj scioj dum la transiro.'

# Esperanto en spaco

La aktoro William Shatner, kiu rolludis kapitanon de stelŝipo, estis sendita al la vera kosmo. La televidila programo *Star Trek* estis, kaj restas, unu el la plej famaj sciencfikciaj ideoj pri bona estonteco, de la 20a jarcento. Shatner estis la ĉefrolulo en la filmo *Incubus*, kiu estis (unu el) la plej unua(j) filmoj entute farita uzante la esperantan lingvon. La filmo, kvankam profesie farita, ne estas alte aprezata pro la malbonega prononcado (kaj la rakonto mem). Tamen, kiam retrovita, Incubus furoris ĉe esperantaj kunvenoj. Shatner mem ne vere estas esperantisto (onidiroj kontraŭas), tamen li uzis la lingvon en vera komerca filmo, kaj ne malsubtenas. Shatner vere estis nur pasaĝero, ne kosmonaŭto. Sed ni havas veran kosmonaŭton kiu estis esperantisto, la hungaron Bertalan Farkas. Legu ĉe:
http://www.eszperanto.hu/egyeb/kosmonauto_kaj_Esperanto_Farkas_Bertalan.pdf

Legu plion en la novembra numero de revuo *Esperanto*, kiu jam aperis rete.

# Afrika historio eksponota en Berlino



Okazos prelego la 1-an de novembro en la Esperanto-Butiko Berlin. Temas pri iam fama, sed forgesita esperantisto **Ernst Kliemke**, kiu estis

direktoro de la Orientafrika Fervoja Kompanio en la nuna Tanzanio. Sub lia gvido la fervojo atingis la lagon Tanganjika en 1914 kaj oni sukcesis tie konstrui vaporŝipon, la nuna "Liemba", kiu estas ankoraŭ veturanta.

https://esperanto.berlin/lunde-ce-viktoriaparko-novembro-2021-d-ro-ernst-kliemke-respondeculo-por-orientafrika-fervojo/

En la prelego eblas mencii la Esperanto-aadojn en la nuna teritorio de la iam germana kolonio (Tanzanio, Burundo, Ruando). Bv. sendi fidindajn informojn (preferinde ligiloj, ne dokumentoj).

# Hispanoj daŭre aktivas kulture

Jam disponeblas la du verkoj per kiuj Hispana Esperanto-Federacio omaĝas ĉi-jare la grandan poeton Federico García Lorca, en la 85a datreveno de lia murdo. Temas pri la bita reeldono de la Cigana Romancaro, tradukita antaŭ 50 jaroj de Fernando de Diego, kaj pri la papera eldono de nova antologio de poemoj, tradukitaj de Miguel Fernández, "Omaĝe al Lorca".

Legu la detalojn en: https://www.esperanto.es/hef/index.php/447

Cigana romancaro estas libere elŝutebla en tiu ĉi ligilo: https://bitoteko.esperanto.es/xmlui/handle/11013/6429

Ankaŭ eblas spekti la videan prezenton de la omaĝo, okazintan dum la virtuala Hispana Kongreso de Esperanto, la 2an de oktobro, en jena ligilo: https://www.youtube.com/watch?v=RKoZPBDYLKs

José Antonio del Barrio, Fundación Esperanto, http://www.esperanto.es/fundacion/

**Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

ilei

**Helpantoj:**
Rob Moerbeek
Gbeglo Koffi
François
Lo Jacomo

**ENHAVO**

- Retkurso en Ĉinio
- ILEI trimonate
- Tanzania lagboato
- Hispana kongreso - memore al Frederiko Garcia Lorca

========= vortoj: 790 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la 17a aŭgusto 2021 (per EKO 2021-34). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.